

Theodor Storm,  
 Oktobra kanto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Nebulas, falas foliar';  
 La glason vi plenigu!  
 La grizan tagon ni al ni  
 Per vino pliheligu!

Se furiozas ĉio ĉi  
 Ekstere en la mondo,  
 Ne estas detruenda ja,  
 La bela tera rondo!

Se tremas ankaŭ via kor',  
 La glasojn vi tintigu!  
 La ŝtormo ekster nia dom'  
 Min ne malkuraĝigu!

Nebulas, falas foliar';  
 La glason vi plenigu!  
 La grizan tagon ni al ni  
 Per vino pliheligu!

Aŭtuno regas ĉie, sed  
 Atendu nur tempeton!<sup>2</sup>  
 La suno ridos, la printemp'  
 Kreskigos ja floretan.

...

---

<sup>2</sup>aŭ eble:  
 Atendu nur momenton!  
 La suno ridos, la printemp'

La bluaj tagoj ekas nun,  
Ni volas ilin ĝui;  
La tempo fluas, vane ni  
Ne lasu ĝin forflui!

*Traduko de la Germana poemo "Oktoberlied" de THEODOR STORM (Teodoro Stormo, \*1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-174-351 (2004-02-22 17:52:01)*

---

Kalmigos ja la venton.